


500192:7

s. grenkamp-kornfeld

5.000.000



Aliaj rekomendindaj libroj

BASTIEN

NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO

250 pĝ. Fr. sv. 5.—

VORTOJ de Prof. CART

luxsa eldono

140 pĝ. Fr. sv. 3.—

FRUICTIER & GRENKAMP

KOMPLETA GRAMATIKO KAJ VORTFARADO DE ESPERANTO

200 pĝ. broŝ. : Fr. sv. 5.—
bind. : Fr. sv. 6.50

GRENKAMP

KRIOJ DE L' KORO

32 pĝ. Fr. sv. 0.25

GRENKAMP

PENSEROJ, 2-a kajero

64 pĝ. Fr. sv. 0.40

58 673

F 83-A.

8 3 47

5.000.000



Aliaj esperantaj verkoj de l' aŭtoro

APERIS :

BALUCKI, Kuzeto.

Kompletny Samouczek j. Esperanto.

Krioj de l' koro.

Penseroj, I-a kajero.

Penseroj, II-a kajero.

WYŚLOUCH, El la lando de ruinoj.

En kunlaboro :

Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto.

Plena Vortaro de Esperanto.

Vortoj de prof. Cart.

EN PREPARO :

Ĉu vi volas ridi ?

Enciklopedia Vortaro de Esperanto.

Esperanta Krestomatio.

Kion homoj valoras.

La pola folkloro kaj popolkanto.

ST. REYMONT : Noveloj.

Stanislaw Reymont, *biografio*.

Tra l' okulvitroj de l' sincero.

S. Grenkamp-Kornfeld

5.000.000

Eldonejo "Esperantista Voĉo"
Jasło (Pollando)



821.322-3

*Ĉiuj rajtoj de tradukado, represigado kaj adaptado rezervitaj
por ĉiuj landoj inkluzive Sovetlando*

Copyright by S. Grenkamp-Kornfeld 1931

*La plej granda signo de
estimo, per kia oni povas
regali amikon, estas diri al
li la veron.*

*La esperantistoj estas miaj
amikoj.*

UNU KONSILO :

*Pli bone ne malfermu la libron,
se vi ne intencas ĝin legi.*

UNU PETO :

*Se la libro ne plaĉos al vi,
rekomendu ĝin al viaj amikoj.*



A ESPERANTISTA PUBLIKO
*estas diversspeca. Troviĝas
en ĝi honestaj tipoj, sed
malmulte da aĉetantoj de
esperanta libro. Ĉiu faras
laŭ sia povo. Riĉulo elspezas monon,
malriĉulo ne aĉetas librojn.*

*Verkisto skribas siajn travivojn,
siajn suferojn kaj ĝojojn, siajn espe-
rojn kaj malesperojn. Kelkafoje pri
esperanto aŭ en esperanto.*

Kiam lia manuskriptaro tro abundas, li decidas ion aperigi.

Kelkaj aperigas siajn poeziojn, kiujn neniu legas. Aliaj historiojn, kiuj ne ĉiam estas ĝustaj. Fine aliaj elsputas sian galon prese sur paperon.

Diversece montriĝas la pasio sur nia Parnaso.

Estus honte esti esperantisto, kvankam sentitola profesoro, kaj ne eldoni verkon...

La lastajn jarojn ŝvelas la originala literaturo.

La « tasko » de unuj estas esplori fuŝe la ludon de la sentoj kaj la espriman povon de nia lingvo. Kial la mia ne estu pli modesta: elspezigi al aliaj la monon?

Mi estas certa, ke mi faras bonan agon. Unue mi plipezigas la enspezojn de la presisto, due mi faras plezuron

al la Esperantista Akademio. Ĝi havos libron por povi ĝin rekomendi, kvankam ĝia tasko estos malfacila. Sed sen laboro, ne alfluas oro, — nek venas la gloro...

Kaj ĉu mi parolu pri la aliaj avantaĝoj?

Kritikistoj povos kritiki, vortaristoj serĉi novajn vortojn, seriozuloj iom moki, amikoj peti senpagajn ekzemplerojn...

Mi eĉ esperas, ke la simpatia recenzisto, kiu trovis en unu verko iom da mia salo, trovos ĉi tie iom — da pipro...

✱ ✱ ✱

Oni povus tamen fari riproĉon. Kial ĝuste tion, kaj ne ion alian, vi eldonas?

✱ ✱ ✱

La afero estas klara. Mi trovis en mia ledoteko, uzata nur dum grandaj festotagoj (veturo al kongreso, vizito al esperantisto), kelkajn gazet-eltranĉojn kun miaj aperintaĵoj. Mi sendis ilin al la presisto. Tio, kio unufoje jam aperis, travivis la cenzuron kaj konsekvence meritis la silenton...

Sed malfeliĉe restis iom da blanka papero. Mi do eltiris laŭsorte kelkajn foliojn el la manuskripta kesto, por nigrigi la blankajn makulojn. Tiel kreigis tiu ĉi libro...

Eĉ en dramoj laŭ Ŝekspir troviĝas interaktoj. Estu tiu libro tia interakto.


Iom senorda, senpensa, aŭ, se vi preferas, misorda, mispensa... Pro tio ĝi meritas vian atenton.

Tio, kio estas en ordo, ne troviĝas generale sur tagordo...

Mi pro tio esperas, ke tiu libro forvagos en kabanojn de honestuloj. Kvankam malhonestaj povus ankaŭ profiti. Ili samtempe ebligus aperigi alian...

Ju pli da verkoj, des pli da papero...

Parizo, en 1930.



Ni ĉiam povas per kurba vojo
al rekta celo veni...

S-o Dolarer, prezidanto de la Nord-amerika Esperanta Fonofilma Kompanio kaj proprulo de 90 % da akcioj de tiu grava societo, eniris sian loĝejon en tre bona humoro. La transakcio kun la Eŭropa Universala Fonofilma Asocio neesperite sukcesis. S-o Dolarer esperis per tiu afero gajni proksimume kvin milionojn da dolaroj kaj lia mondpercepto estis ĉi-momente roze



ŝminkita konforme al tiu ĉi bela ronda sumeto. Li eĉ momente pro forgeso intencis kabli al la malnobla (legu: malnova) kontinento, por pagi kelkajn brikojn al la ankoraŭ mortante-vivanta esperanto-grupo de Parizo. Sed lia francdevena sekretario Rusol direktis liajn pensojn al konstruo de la sesa etaĝo por la kabano de l' Esperantista Akademio, al kiu, krom multe, mankis io...

Estis la sesa tridek vespere, kiam li troviĝis sola en sia hejmo. La subiranta suno ĵetadis orajn makulojn sur la brilantajn plankojn de lia luksa apartamento, troviĝanta sur la tridek-kvina etaĝo de grandega nub-skrapulo. Frapis liajn okulojn la ĝenerala gajo de mebloj. La bildoj el dikaj oritaj kadroj ankaŭ ridetis al li. Ne volante kontrasti kun simila ĉirkaŭo, s-o Do-

larer daŭrigis rideti kaj gaji. Li ekfumis cigaron je malalta por li prezo de unu dolaro kaj ekmeditis, kiel li devus pasigi la reston de l' tago. Forvagis flanken liaj pensoj de rondaj sumetoj kaj ektuŝis — la rondaĵojn de lia Renjo... Post kelkaj minutoj de necifera ekstazo li esprimis sian penson laŭte: mi prenos Renjon kaj ni iros al la Verda Kato, se ĝi ankoraŭ funkcias...

S-o Zenao Dolarer iris al sia kabineto por telefoni al Renjo. Li malfermis la pordon. Ekstaris sur la pordosojlo kaj restis sur ĝi kvazaŭ alforĝita. Rektigita. Senmova kiel vera monumento de ekmiro kaj konsterno aŭ usona monumento de — Libero... Sur la skribotablo, kies valoron li nun ne pensis pritaksi, staris nigra kesteto. Ĉe unu angulo vidiĝis malgranda kupra rulaĵo. Elinterne aŭdiĝis sonoj.

Ne de agrabla klasika ĝazbando, sed rememorigantaj la tiktakadon de horloĝo... La haroj ne stariĝis sur lia frapante-pala kapo, sed simple nur pro tio, ke tiu harstariĝo estas elpensita de tiuj, kiuj neniam timis. Dume kontraŭe li sentis la finon de l' mondo tiel fulme, kiel lia haŭto surdorse sulkiĝis kaj kiel lia frunto fariĝis malvarma kaj humida... Frapis lin teruro. En lia kapo estis nur ĥaoso kaj fajro. Kiel hipnotita li alforĝis sian rigardon en la nigran kesteton dum kelkaj minutoj. Lian cerbon eksieĝis nur unu penso : *Infera maŝino!*

Subite li sin turnis kaj kuris en la direkton de la elirpordo. Li trovis ĝin ŝlosita. Li komencis lukti kontraŭ ĝi kiel furioza besto aŭ honesta homo... Sur la feraj stangoj li disrompis al si la ungojn, por kies manikuro li pagis

kvin dolarojn... Defrotis al si la manhaŭton, sed la pordo ne cedis. Malantaŭ ĝi aŭdiĝis voĉo :

— Ĉu estas vi, s-o Dolarer, kiu klopodas tiom energie malbonigi la precizan mekanismon de tiu ŝtala pordo? Nur falsa mono aŭ falsaj amikoj perfidas sian ĝustan valoron. Ne penudo, sinjoro! Vi ne malfermos ĝin!

— Al diablo, kiu estas tie?

— Bedaŭrinde, la diabla helpo ne estas tiel efika, kiel oni ĝenerale opinias. Pro tio kredu malpli, ol oni diras al vi, esceptinte nur, kiam temas pri aĝo de virino... Mi alvenis tute simple per lifto. Rilate al la pordo, mi ĝin fermis de ĉi tie. Ĉu vi memoras, kiom da komplikitaj aranĝoj vi adaptis por vin asekuri kontraŭ enŝtelo? Mi devas konfesi, kun respekto por la laboristo, ke la pordo estas

admirinde rezista. El tio ankaŭ konkludu, ke vi ĝin ne malfermos sen mia modesta helpo.

— Ĉu vi frenezigis? Ĉi tie estas infera maŝino!

— Mi scias tion sufiĉe detale. Estas mi mem, kiu alportis al vi tiun donacon.

— Kanajlo!

— Trankviliĝu sinjoro, mi ja ne estas nescie pagata prezidanto de iu ideala Asocio. Cetere momente nenio vin minacas. La maŝino eksplodos akurate post tridek-kvin minutoj, — tiom da etaĝoj havas tiu nub-skrapulo. Vi havas do la tempon aŭskulti, kion mi diros. En via kabineto troviĝas kaso, kies formoj aŭ pli ĝuste la enhavo, rememoras al mi la sklavigon de la malnova kontinento per sonanta oro. En ĝi troviĝas kvin milionoj da

dolaroj. Estus al mi tre agrable fariĝi ĝia posedanto. Tio ebligus al mi viziti trankvile la muzeon de Luvr en Parizo. Antaŭ tri horoj mi admiris vian apartamenton kaj penis malfermi vian kason. Sed sensukcese kaj tio spite uzo de oksigeno kaj elektra borilo. Kiel memoraĵon mi lasis la inferan maŝinon...

— Bandito, kanajlo!

— Kaj nun — daŭrigis la nepetita gasto — mi rekomendas al vi iri al la kabineto kaj alporti la monon ĝis la pordo. Poste mi volonte donos al vi afable pluajn konsilojn. Vi permesos kelkajn aldonajn klarigojn. La maŝino enhavas unu kilogramon da dinamito kaj tri kilogramojn da nitroglicerino. Tio estas sufiĉa kvanto por dispecigi ne nur ĉiujn ujajn formojn en nia ĉarma lingvo, sed ankaŭ dis-

frakasi vian apartamenton, altvalorajn bildojn, paligi la enigman vizagon de Ĝjokonda, kies falsa kopio troviĝas en Luvr, diserigi la reston... Ĉe unu angulo de la kesteto troviĝas kupra rulaĵo, kiu konsistas el ringoj havantaj literojn. Kiam la dolaroj estos en mia posedo, mi ne forgesos doni al vi la nomon, kiu vin interesas. Mi konsilas al vi prudente, ne malfermi la fenestron kaj ne alarmi. Unue neniu vin aŭdos de tia paradiza alto, kaj due — eĉ se iu aŭdus — mi povus dume malsupreniri kaj forpafi min. Kaj antaŭ ol iu seruristo-majstro malfermus tiun altvaloran pordon, la nobla loĝejo de via animo troviĝus en plorinda stato. Mi supozas, ke perdo de kvinmilionas sumeto ne malriĉigos vin, pripensinte, ke vi gajnas kvinoble pli jare.

S-o Dolarer estis homo praktika.

Trankviliĝinte el tiu konsterniĝo kaj primeditinte detale la vortojn de nekonata teroristo, li venis al la konkludo, ke plej bone elpreni la monon el la kaso kaj ĝin doni. Tio estas cetere pli bona ol la eksplodo de la infera maŝino. Kun dolorplena koro li iris al la kabineto kaj revenis kun granda pakaĵo da agrable susurantaj bankbiletoj.

— Vi ne estas tre prudenta, sinjoro Dolarer. Mi miras, ke vi hejme tenas tian grandan monsumon. Kvankam eĉ la plej grandaj bankoj okaze bankrotas, tamen pli bone deponi la monon en la banka kaso aŭ ĉe UEA, ol en la sia. Sed — nun bonvolu atenti. Mi forigos la platon de l'aperturo, tra kiu oni enĵetas al vi la poŝtaĵojn. Vi bonvolos afable tra ĝi transdoni al mi la dolarpakaĵojn. Mi nur avertas vin, ke vi

ne bonvolu provi pafi el revolvero. Tio nenion bonan al vi povas alporti. Pafi per okuloj ankaŭ ne valoras, ĉar Renjo malproksime... Kaj nun rapidu! La eksplodo okazos post dekkvin minutoj.

Insultante subnaze s-o Dolarer elĵetadis tra l'aperturo la dolarpakaĵojn.

— Jam ĉio, li elgorĝis.

— Mi tre dankas al vi. Mi esperas, ke vi ne trompis min kaj bonvolis transdoni la tutan rondan sumeton.

— Je l'honorvorto! Nun pli rapide diru al mi la vorton!

— Kun verda plezuro, sinjoro! Ĝia nomo: esperanto! Sed vi povas tute ne peni kaj ne malfermi la kesteton. Nun nenia danĝero por vi.

— Kiel? Kion tio signifas?

— Tute simple; en via ĉarma loĝejo ne troviĝas infera maŝino. Tiu nigra

kesteto estas simpla nigra kesteto. En ĝi troviĝas ordinara foira vekhorloĝo, kiun mi aĉetis je du dolaroj. Ĉu vi estus povinta supozi, ke mi estas homo tiom malatenta por agi helpe de infera maŝino? Tio ja povus konduki min — laŭ usonaj leĝoj — al elektra seĝo, se mi estus kaptita. Sed ektimigi iun per agrable tiktakanta vekhorloĝo ne povas kaŭzi al mi tro seriozajn konsekvencojn. Plej multe kvin jarojn da aresto...

Ekregis silento... Oni aŭdis nur la permanan kunbalaon de kraketantaj banknotoj kaj la fortan spiron de la prezidanto de la Nordamerika Esperanta Fonofilma Kompanio.

Subite la silenton interrompis s-o Dolarer per tiom gaja voĉo, ke la nekonato ĉesis sian agrablan laboron kaj komencis atentostreĉe aŭskulti.

— Sinjoro filozofo! Mi ne havas la plezuron koni vin persone, sed mi venis al la konkludo, ke se vi ne estas geniulo, vi estas almenaŭ talenta profesoro de rekta metodo... Mi volonte donacos al vi la kvin milionojn kaj ne sciigos la policon, se vi plenumos mian peton.

La mistera ĝentilhomo ekridetis:

— Mi promesas al vi fari ĉion, kio nur estas en mia povo.

— Vi scias certe tre bone, ke mia plej granda konkuranto, kiun volonte mi disfrotus al polvo, estas s-o Neniulov, la prezidanto de la Telefonofilma Kompanio. Tiu sinjoro penas min ruinigi jam de tri jaroj kaj sur tio forĝas sian sorton. Ĝis nun tio ne sukcesis al li. Sed, se ne li, miaj enspezoj estus kvinoble pli sonantaj, ol nun. Hieraŭ, mi eksciis, ke s-o Ne-

niulov ricevos morgaŭ el Eŭropo transporton de kvar milionoj da dolaroj. Li ankaŭ havas la kutimon teni la monon en sia kaso. Li hejmas sola, kiel mi. Danko mi estus al vi, se vi bonvolus simple ripeti vian admirindan ruzon, kiun vi tiom talente prezentis al mi. Memoru, ke la vivo ne baziĝas nepre sur ia *originala* faro, sed sur *lerta* ago. Agu do lerte, jen ĉio! Kaj ne forgesu, ke mi elĵonglos al vi la profesoran diplomon de l' Internacia Instituto de Esperanto...

Malantaŭ la pordo aŭdiĝis laŭtarido.

— Sinjoro Dolarer, mi estus plenuminta vian peton, sed je l' ventrikloj de mia koro, tio estas tute neeble, eĉ spite via bonvolo oferi al mi la profesoran diplomon...

— Kial?

— Ĉar tiun petolaĵon kun infera maŝino mi demonstris jam hieraŭ ĉe s-o Neniulov. Vi estas misinformita, sinjoro Dolarer. La Prezidanto de la Telefonofilma Kompanio ricevis la monon hieraŭ matene. Vespere mi fariĝis la posedanto de tiu sumeto. S-o Neniulov jam forsuferis tiun pardon. Li eĉ promesis al mi senpunecon, se mi konsentos same forpreni viajn kvin milionojn. Mi estas al li tre danka pro tiu patra konsilo... Tempo estas mono, sinjoro Dolarer. Mi devas vin adiaŭi. Mi ne forgesos serĉi ĉe SAT la plej bonan seruriston por vi. Dume, bonan nokton, sinjoro! Sincere mi bedaŭras vin, ke mi ne povas plenumi vian sagacan deziron...

S-o Dolarer silentis...

\$ \$ \$

La morgaŭan tagon en ĉiuj ĵurnaloj de l' mondo oni povis legi jenan kablogramon :

« *Icoko* (Esperantio).
— Io farota por la Esperanto-Movado. Unu miliono da dolaroj ekspedita de nekonato al neorganizitaj esperantistoj. »



Buŝo, Okuloj kaj Koro

IUN vintran vesperon, sub strata lanterno, kiam ploris pluva ĉielo, mi legis ŝian karesan leteron. Per bluaj literoj ĝi alportis al mi buŝon ŝian kaj ŝiajn okulojn.



IUN vesperon someran, roze parfumitan, sub ĉielo floranta per delikata kaj rava klaro, mi legis ŝian malgajan leteron. Per nigraj literoj mi eksciis subite, ke koro ŝia min forlasas...



Al...

KUPEROZON vi ne havas amiko...



Se vi ne estus malofta kiel ksenono,
se via haŭto estus nur kutiklo,
se nek kriptorkidioj al vi malhelpus
esti pli humanaj,
se la krasulacoj kaj koronilo perdus
siajn belajn florojn,
se korizo ne difektus vian nazon,

se manĝi fruktojn vi povus netuŝante
 koronolon,
 se da koprolito sur la tero estus pli
 ol da nenecesa homa karno,
 se kopalon ne plu oni uzus por fari
 lakon,

se la konektivo malaperus,
se kongro estus nur tri-centimetra,
se kondilomo trafus ĉiun misulon,
se la skvamoj de la krizofrio estus
verdkoloraj,
se homoj-bestoj estus koniventaj, kiel
plantopartoj,

tiam
kontravalaciado estus nur morale
historie-enciklopedia...



Oni povas al homoj ĉion diri
kun escepto de la vero pri
ili mem.

Al — tiam juna amiko...

Sereno

Vⁱ vundis min...

Mi suferis.

Mi ne volas supozi, ke eĉ plej granda fripono ne havas konscienc-riproĉojn.

Se tiaj ĉe vi ekzistas, la pardono estas al vi donita.

Kaj iun tagon venos la forgeso...



La ĉielo gardas nin ambaŭ sur la tero...

Eble eĉ iam sur la samaj remparoj ni devos defendi nian komunan trezoron : esperanton.



Kial vi verŝis al mi tiun amaran vinon, por defendi vin kontraŭ viaj misagoj?

Kial vi donis al mi venenon, kiu vin paligis?

Kial?

Ĉu necesis al vi, ke la vivo elsuĉu *mian* sangon el *mia* koro?



Kun vespera ardo mi promenas sur la montoj de mia urbeto kaj rigardas

kun bedaŭro, sed sen malamo, la sin-eluzon de la mortanta pasinteco...

De l'sveninta tago naskiĝos nova tago.



Kiom bela, serena estas la naturo, kiu permesas forgesi la plej kruelajn maljustojn kaj misagojn de aliaj.

Ĉirkaŭvolvu min, ho, Naturo, per via sereno, per via trankvilo, per via pardonemo kaj forgesemo!

Etendu sur min vian amon kaj vian pacon.



Rigardu :

Jen la paco de l'ombro. La somero endormiĝas...

Rigardu :

Ĉio estas trankvila...

Miaj pensoj ŝvebas super la tran-
kvilaj etendoj de l' vespero...

☪ ☪ ☪

Sed...

Ĉu
friponoj
havas
konscienc-riproĉojn?



Ŝi havis dek

kaj

li dek-kvin jarojn

IE en la urbeto najbaris du vilaoj,
similaj al si kiel kataj ĝemeloj
aŭ homaj dunaskitoj. Grizaj, kun ruĝaj
tegmento, kies du okuloj-fenestroj
pliseriozigis ilian aspekton. La kamen-
tuboj apenaŭ estis rimarkeblaj de la
strata flanko. La vilaojn ĉirkaŭpre-
nadis grandaj ĝardenoj, kie la arboj
kreskis humile-trankvile, kaj kiujn
nur heĝo dividis. Sola distingo : la

du komfortaj hejmoj apartenis al du familioj...

En unu loĝis ŝi, la dek-jara, kun sia onklino-vidvino, kiu post la morto de ŝia amata edzo, ekjuniĝis, fariĝis pli eleganta kaj mondana. En la alia li, la dek-kvin-jara, kun sia patrino, ankaŭ vidvino. Ŝia okupo: filantropio.

La vidvinoj nur supraĵe rilatis unu al la alia. Ili opiniis, ke tion oni povas lasi al la infanoj. La infanoj estis preskaŭ ĉiam kune. Ili ludetis kaj kelkfoje disputetis; kvankam nia Edvardo, timema kaj malobstinema, volonte ĉiam akceptadis la konsilojn kaj dezirojn de la viveca Eva...

La infanaj jaroj pasas. En la junecaj ili preferis sin amuzi per kisoj kaj talenti en ampromesoj...

En la ĝardeno de s-ino Volasami, la vivplena onklino de Eva, estis laŭbo

sur kiu lace-pace grimpis vinberoj. Ili nur ĝoje ridetis, kiam la suno forrapidadis per kilometraj paŝoj sur la alian duonteron kaj la luno malkaŝadis sian kavaĵan kapon. Ili ridis de ĝi, ĉar ĝi eĉ lipharojn ne havis, kiel mondana junulo aŭ profesia esperantisto...



Tra l' fenestroj fluas en ĉambron oraj tukoj de brilo, sur kiuj polva nubobrodas per formikaj piedetoj brodaĵojn — sed en laŭbo bone kaŝita inter vinberoj kaj arboj, nur mallumo estas palpebla vespere...

Tie, en fundo de l' ĝardeno, en la for de okuloj kaŝita laŭbo, plej ofte rendevuis niaj maturaj infanoj. Sur benko varma pro iliaj korpoj, ili revis pri la granda ĝojo ami kaj esti amataj.

— Ĉu vi amas min, Eva?

— Vi scias ja bone...

Ili sciis ja bone, sed la ripetado-flustrado estas ĉiam agrabla.

— Ho, kiom feliĉa mi estos, kiam mi baldaŭ finos la gimnaziajn studojn, vizitos la universitaton kaj povos vin premi por ĉiam! Kia feliĉo! Kiel mi amas vin, Eva!

— Mia kara, kara Edvarĉjo!



Pasis iom da tempo. Sur la horizonto de lia revo montriĝis kelkafoje granda, nigra makulo — ĵaluzo.



En liberaj momentoj ili vizitis aliajn junajn knabojn kaj knabinojn. Sportis, ludis tenison kaj boatis. Ni vivas ja

en la epoko, en kiu oni ŝatas homon fortike ĉarpentitan.

S-ino Volasami aranĝadis ĉe si ofte dancvesperojn. La nevino ja fraŭliniĝis kaj ŝi mem, verkonfese, ankaŭ ŝatis la klasikan dancon *shimmy*, en kiu, intimdire, oni forgesas pri siaj korpopartoj...



— La duonbarela junuleto Rokofirm tro premŝovis sin en la junan societon, — opiniis Edvardo dum rendevuo kvarokula kun sia amo.

— Kiu li estas?

— Vi scias ja bone. Li heredis la bienon Bo kaj la kastelon Io ⁽¹⁾... Almenaŭ tion rakontis al mi mia onklino, flustris Eva.

— Li estas tre simpatia, ĉu ne Eva?

(1) Por fari plezuron al ioanoj...

— Eĉ ĉe la plej bona volo mi ne povas kutimiĝi al tia penso. Mi trovas lin tro dika.

— Li dancis la tutan tempon kun vi. Sur lin vi alcelis viajn dolĉajn okulojn.

— Kun mi? Sur lin? Sed vi ja dancis kun mi la tutan tempon — elpepis ŝia ĉarma buŝeto...

— Ĉu eble mi enuas vin?...

— Vi estas freneza aŭ ĵaluza. Vi scias ja bone, ke s-o Rokofirm amin-dumas mian onklinon kaj pro tio li venas tiel ofte.

— Sed ŝi estas pli aĝa ol li...

— Mi ne kredas... Kaj ĉu ŝi ne estas bela, ĉarma, agrabla, altira?...

— Mi ne scias. Nur vin mi vidas, nur vin, ĝemis kore-plore Edvardo, en kiu blovis la fajro de l' venĝemo kontraŭ Rokofirm.

— Tre laŭde-aplaŭde, ke vi tion diras al mi... Kaj nun adiaŭ, vi ja sufiĉe patris min.

Edvardo volonte ankoraŭ estus dirinta ion, sed li ne eblis elvortumi siajn pajlajn pensojn...



Pasis kelkaj tagoj sen revido. Nia Edvardo, por sukcesi ekzamenon, karesis siajn librojn, por ke liaj kornecaj scioj estu pli poluritaj en lia cerbo...



Iun matenon, kiam post pluvaj tagoj la koto fleksiĝis kvazaŭ danke sub liaj piedoj kaj sulkiĝis ĝia rideto, — li renkontis Evan sur tenisa placo. Lia rigardo laŭkuris de la piedoj ĝis la kapo la gracian figuron de lia amo, haltante kelkloke... Ŝi ŝajnis senco-

kaŝa frazo, kian oni renkontas ofte sub la plumo de lerta gvidanto... Ŝia fizionomio havis ian ŝanĝon. Ŝia kutime neŝminkita palo de l' vangoj cedis la lokon al flama ruĝo... Ĉirkaŭ la buŝo ludis svarmo da ridetoj, jen plaĉivolaj jen petolaj... La troa gajo de Eva faris preman impreson sur la menson de Edvardo.

Sed amikoj, konatoj, raketoj kaj pilkoj ne permesas al intimaĵoj kaj surprizoj.

— Kio estas al vi? estis la sola demando, kiun li sukcesis ĵeti lerte, ne-atente.

— Venu en laŭbon, elsusuris ŝiaj lipoj.

♣ ♣ ♣

Hejme atendis lin surprizo el la buŝo de l' patrino — pinĉpremo da vero...

— Ĉu vi scias, ke Eva edziniĝas? Ŝi edziniĝas kun s-o Rokofirm. Ĉu vi memoras? Kun tiu, kiu tiom ofte venadis al ŝia onklino. Oni diras, ke tio estas edziniĝo pro amo flamanta al sako sonanta...

La tero ektondris sub liaj piedoj...

— Neeble, neeble, sonis al li forte, potence.

♣ ♣ ♣

Edziĝo!

Edziĝo nur akto de prikalkulo kaj ne akto de amo, neeble...

♣ ♣ ♣

Venis la tiom atendata vespero. Liaj piedoj-flugiloj forportis lin al la laŭbo, kie Eva jam atendis.

— Malvero, mensogo, ĉu ne, Eva, — li elspiris peze, dolore...

— Oni jam diris al vi... Do, jes,

estas vero, mi edziniĝas... Vi komprenas, ni estis june-frenezaj kaj freneze-junaj. Kaj cetere mi estas pli juna ol vi...

— Sed ĉu vere, kun Rokofirm vi edziniĝas? Kun li, kiu ja al onklino?...

— Mi eraris, trompiĝis. Li venadis pro mi, nur pro mi. Li amis min. Jam delonge. Li diris al mia onklino, ke li ĉion faros por mi. Ni vivos en granda urbo. Tie li aĉetos belan vilaon...

— Sed li estas tro maljuna por vi, li eksplodis per larmoj...

— Nur kvardekon. Kio estas kelkaj dekoj da diferenco, mia kara?

— Sed vi ja ne amas lin, nur min, *min*. Vi tion ĉiam diradis, jesis. Nur via onklino devigas vin al tiu frenezo, al tiu edziniĝo... Ŝi edzinigas vin. Mi kuros al ŝi... Mi parolos, persvados...


— Mi malpermesas al vi tion. Kia

egoisto! Katenigi por la vivo vi min volis! Mi ja diradis « jes », sed nur por fari al vi plezuron, jen ĉio — kaj vi volas ankoraŭ malhelpi, ke mi estu feliĉa... Kaj tion vi nomas amo!? Adiaŭ, maldankema!



Dorna estas la vojo de l' homaj rilatoj.

Teruraj la tagoj de l' malespero!



Nia Edvardo ne plu rekonadis la guston de l' manĝoj kaj la kolorojn de l' homaj rigardoj...

Lia psiko sangis seninterrompe... La mondo fariĝis por li nuda kaj la nudo estas la sola vero...



Dum li estis for malsana ĉe l' marbordo sub patrina flego — Eva edziniĝis kaj elflugis por miela monato.



Kiam oni hejmon envenas, ĉagrenoj, suferoj revenas, diras luna proverbo. — Tiel okazis al Edvardo.

Jam la morgaŭan vesperon, post sia reveno, laŭkutime li trasaltis heĝon kaj rapidis la laŭbon, — lokon de liaj revoj kaj doloroj... De lia pasinteco... De iliaj kisoj kaj iliaj ĵuroj... Kie iliaj korpoj kunpremiĝadis... Du estis tiam kapoj, kiel rozoj elŝprucintaj el la sama juna branĉo...

Li ekploris...

Subite ia mano virina ektuŝis lian brakon. Li nek sentis nek aŭdis. Li ne aŭdis la alvenon de s-ino Volasami.

— Kion vi faras ĉi tie, kial vi ploras, Edvardo, ŝi elsopiris rapide...

Kaj torente fluis la vero : liaj revoj, malespero kaj doloro pro ŝi, kiun li amis per tuta forto de sia koro... Kaj li elveis sian grandan suferon. Tion, kion li povis diri al neniŭ. Antaŭ neniŭ konfesi, ne eĉ antaŭ sia panjo...

Kaj ŝi aŭskultis la vortojn kaj la plorojn, lian koron kaj animon elkanti ĝeme la travivojn... Kaj ŝi, per vortoj plenaj de patrina dolĉo, trankviligadis lin... Liaj pensoj lacigite konfuziĝis, la plorskuoj mildiĝis kaj dormema dolĉo ekkaptis lin apud tiu virino...



Kaj ŝajne neniam mi forkuros
de ĝi, ĉar ne kapablos mi —
de mi mem forkuri.

Kaj ĝi postsekvis min...

KAJ ĝi postsekvis min.
Ĝi — la nedisigebla kunulo de
mia infaneco.

Ĝi — kiu ĉiam pli kaj pli eniĝadis
en animon mian kaj ĉiam pli sen-
kompate min batis.

Ĝi — antaŭ kiu mi volis forkaŝi min.

Ĝi — kiun mi ne plu povis toleri kaj

de kiu mi volis liberiĝi kaj forkuri,
eĉ trans la limojn de tiu ĉi mondo.

Kaj liberiĝi, eĉ se ĝi estus nur por
unu tago, eĉ nur por unu momento,
por povi unu fojon almenaŭ, *unu
fojon*, klare, serene, senzorge rigardi
la mondon.

Sed ĝi postsekvis min.

Kaj vane la itala ĉielo per siaj la-
zuro kaj brilo ridetis al mi.


Kaj vane la cipresoj kaj la piniaj
arboj oriĝis en la oraj radioj de l' suno,
kvazaŭ oraj pilastroj de iaj misteraj,
fantaziaj palacoj.

Kaj vane la tero kolorojn kaj aro-
mojn de siaj floroj disetendadis sub
miaj piedoj.

Ĝi tamen postsekvis min ĉiam.

Kaj per sia ombro malluma, tomba,
ĝi kovris ĉion antaŭ mi per peza ko-
vrilo.

Kaj mia koro ploris, veis profunde.



Kaj vane al mi maro kantis sian kanton, — ĝojan, serenon kanton.

Mi aŭdis ĝin — spite ĉio — en interparoladoj de ĉebordaj ŝtonoj kaj elsekiĝintaj arboj, kiuj en akvoj de Sekvano sin rigardis scivole.

Mi aŭdis ĝin en la longaj, misteraj paroladoj, kiujn la nokto havis kun siaj helaj, brilantaj steloj.

Mi aŭdis ĝin en la ventegoj, kiuj de unu al alia mondlimo senfine kun ĝemo kaj veokrioj kuregas kaj rompas sin kontraŭ la montoj kaj rokoj.

Kaj en la mallaŭtaj murmuroj de Vistulo, kiu trankvila, serioza, ornamita per koloroj de l' ĉielo kaj de l' matenruĝo kaj per la purpuro de l' vespero kaj per la lumo de l' lunaj

noktoj, fluas majeste, enpensigeme, por sin ĵeti en maron Baltan, por en ĝi droni, pere, morti kaj malaperi.

Kaj ĝi postsekvis min ĉie.

Eĉ al la millaga Finnlando, kie la tuta naturo sin spegulas en la sopirantaj lagoj kaj kie la estanteco rakontas al si la historion de sia popolo.

Ĝi postsekvis min ĉie.

Ĉie ĝi estis kun mi.

Ĉiam la sama.

Ĉiam senkompata.

Kaj nek la varmega suno povis ĝin fortimigi, nek forigi la ventegoj, nek la maro engluti.



Kaj mi aŭdis ĝin en la milda, dolĉa ĉirpado de birdoj, kiuj super mi flugadis;

kaj en la infanaj ridetoj kaj krioj;

kaj mi retrovis ĝin sur la frunto
blanka de l' knabino;


kaj en la palpebrumado de oraj steloj;

kaj en la belaj serenaj noktoj;

kaj en la purpuraj briloj de okci-
dento;

kaj en la sekretaj kantoj, kiujn la
dezerto eligas el siaj sekaj, mortaj
brustoj;

kaj en la vesperaj horoj de mia
urbeto, kiam ĝi malgaja al dormo
kuŝiĝadis.




Ĝi postsekvis min ĉie kaj ĉiam.

Ĝi, la sola fidela amiko.

Kaj tiom kara al mi, kiom mia
propra animo.

Kaj kiun mi tamen nek ekami povis
nek kutimiĝi al ĝi.



Kaj eĉ de sur la Arko Triumfa, kiam
mi, kun grandega neniam trankviligita
sopiro, la lumojn kaj jarcentojn de
Parizo rigardis — ĝi sur min metis
siajn manojn.

Kaj kiam laca mi volis ripozi, ĝi
rigardis min per sia malvarma, sen-
kompata rigardo.

Ĝi — mia necedema amiko.



Kaj mi aŭdis ĝin ĉie kaj vidis ĝin
ĉie kaj sentis ĝin ĉie.

Ĉirkaŭ mi — en mi — en mia animo
— en koro mia — en mia memoro.

Ĝin — kies nomo *malgajo*...



La Amo

SUR la kontraŭa bordo de l' murmuranta rivereto li ekvidis aparaĵon, kian ĝis nun li estis neniam vidinta.

Ĝi similis duone al li, duone al Dio; duone nuda, duone kovrita per verdaj folioj de l' figujo — altiranta lin, loganta kaj forpuŝanta samtempe...

Li ne povis subpremi la ĝermintan pasion kaj superbordiĝantan feliĉsen-

ton. Heliĝis lia enpensigema frunto, lia brusto ebriige enspiradis la bonodoron de la duone ekflorintaj rozoj. Forruliĝis la ŝtono de l' enpensigemo pri la kialo de l' vivo...

Kaj kun rapidaj, fortaj paŝoj li proksimiĝis al la estaĵo.

— Kiu ci estas? li demandis kun tremanta voĉo.

— Mi estas la *Amo*, respondis trankvile la revanta estaĵo, kies hararon orumis paradiza radio de l' suno.

— Kio estas la *amo*? li demandas.

— Feliĉo kaj malfeliĉo, sufero, narkotado kaj malbeno, furiozo kaj doloro!

La vortoj duonsvene forsonis preter liaj oreloj kaj antaŭ ol li ekkomprenis ilin, malaperis la ĉarma estaĵo...



Kaj la unuan fojon Adamo vagis ĉe l' bordoj de l' rivereto, kun koro plena de *malĝojo*.

— Pri kio ci meditas? alparolis lin Dio.

Kun sopirema voĉo Adamo respondis:

— Mi vidis estaĵon, kiu similas al Ci, al anĝeloj kaj mi. Ĝia nomo — *amo*.

— Ankaŭ mi estas *amo*, estis la respondo de Dio.

Adamo, kiu plorplendis sian malĝojon en la profundo de sia koro, skuis malgaje la kapon:

— Ci ne estas ĝi...

Kaj kun fajr-elĵetaj okuloj Adamo petegis:

— Ho, Dio, la Plej Potenca, revenigu al mi la amon, kiun mi vidis kaj kiu malaperis kvazaŭ sonĝo.

Kaj Dio kreis al li tiam la *virinon*, estaĵon similan al Li, al Adamo kaj al la anĝeloj.

Ekrigardis ŝin Adamo kaj defalis la kovrilo de liaj okuloj...

Ŝi ne estis tiu estaĵo, pri kiu revis Adamo.

Ekkolerigita forlasis Dio la paradizon kaj la virino sidiĝis plorante sub la plej bela pomujo paradiza.

La suno ankaŭ tiam deturnis kaj fordirektis sian ĉaron.



Al piedoj de l' virino, kiun larmoj elperfidis, alrampis *serpento* kaj murmurete donis al ŝi vortojn de l' konsolo.

Ŝi leviĝis rapide, postsekvis Adamon kaj alloge ridetante donis al li la *frukton de l' konscio*.

Ŝi forpelis de li la malĝojon de lia koro kaj forkantis la malgajon.

Kun plena entuziasmo, kun fajro brila de l'okuloj, li elvokis :

— Jes, ci estas la *amo*, kiun mi vidis.

Kaj genufleksante li dankis al Dio pro la *donaco*.



Sed ne longe daŭris lia ĝojo en paradizo.

Proksimiĝis al li anĝelo kun flama glavo kaj diris :

— Tio, kion vi nomas *amo*, estas via *unua peko*.

Adamo ĉirkaŭbrakis en silento la virinon kaj sen vorto de l'plendo foriris el paradizo por eniri en *novan paradizon* kaj ekloĝi en ĝi...



La Venĝo

E^{VA}, forpelita el la paradizo, —
revis...

La revo estas la perfidulo de sekretaj pensoj...

Ĝi trafolumas la kartojn de l'vivo...

Venas tamen momentoj, dum kiuj oni ĉesas revi...

Anstataŭ profiti el la libera tempo kaj viziti bibliotekon aŭ muzeon, ŝi decidis preterpasi antaŭ la pordego de l'paradizo. Ŝi emis konfidi siajn ore-

lojn al la paradizaj klaĉoj. Estis neeble ne renkonti tie ĉiujn malnovajn amikojn. Ĉiu ja flaris tra ĝi la aeron de l' tero...

Eva, vestinte sin per freŝa folio de l' figujo, tien direktis siajn paŝojn.

Subite ŝi rimarkis la serpenton kaj rememoris la vortojn de l' konsolo.

En ŝia cerbo eklumis nur unu vorto : VENĜO.

Patose ŝi alparolis lin kaj ankoraŭ unu fojon eksonis tra l' paradizo la mola voĉo eliranta el ŝia jam plenarte ŝminkita buŝo :

— Mi estis naiva sekvante vian konsilon. Mi tamen trovos la okazon min venĝi, kiam vi transpaŝos la pordegon de l' paradizo. Tiam, ve al vi ! Mi senhaŭtigos vin senskrupule. Dume mi ne volas fari al mi aflikton pro tio.

La serpento, kiu tiuepoke suferis

pro hepata malsano, respondis tamen ĝentile :

— Mi eĉ ne supozis, ke doninte la frukton de l' konscio al — Adamo, vi fariĝos tiom sendanka al — mi. Mi jam antaŭvidas, ke la de vi elkovitaj homoj senhaŭtigos unu la alian pro plezuro kaj pasio.

La fantaziaj revoj de eminentaj homoj aŭ bestoj estiĝas realoj en la estonteco.

Eva ne forgesis sian venĝon, kiu rodas en ŝia animo kaj koro, kiel ĝi rodas en la tuta homa gento.

Sed ŝi estis prudenta kaj bone edukita. La venĝo estas ja nutro, kiun oni kutimas manĝi malvarme...



Pasis jarmiloj.

La serpento forgesis jam la dirojn

de Eva. Li enuis en la paradizo kaj — serpentis al la tero por lerni tie ludi bilardon kaj observi la homajn rilatojn.

Sed Eva ne abortigis la penson pri l' venĝo.

Dum longa tempo ŝi penis antaŭ ĉio venki Adamon. Ĉar oni devas unue venki siajn amikojn antaŭ ol povi sin turni kontraŭ siaj malamikoj.

Kiam Eva estis nokaŭtinta Adamon, tiam ŝi povis sian penson direkti al — venĝo.



Kaj iun belan tagon ŝi triumfe ekvestis sin per haŭto de serpento...



Al niaj kamparanoj.

Sonas serpoj, lumas suno...

ARDAN fajron verŝas la suno sur teron. Tremas la varmigita aero. Frivola venteto susuras inter la plenaj kaj maturaj spikoj de greno...

Ankoraŭ kelkaj tagoj kaj la grajno elŝutiĝus. La plej lasta tempo por rikolton komenci.

Falĉiloj kaj serpoj atendas. Iras el vilaĝo falĉistoj sur kampon. Junaj kaj

maljunaj, patroj, filoj kaj nepoj. Staras
ĉe orita greno kaj tranĉi komencas.

Takte, paŝon post paŝo, ili eniĝas
densan, fruktan sekalon. Sekalon
kreske egalan al kampulo...

Kaj la suno brilas, roŝtas, bruligas
senkompate...

Haltas ili momente. Ŝviton forviŝas
de l'frunto. Kaj pluen ekbatas per
serpoj, falĉiloj... Sufokan varmegon
ne plendas... Digraĉo por ili ja estas
serena vetero, ke suno klarlumas kaj
garbojn sekigos...

Kaj, kiam ĉiele montriĝas nubeto,
kortuŝe rigardas falĉistoj kaj zorgo
pentriĝas sur frunto. Ĉu pluvo ne
falos aŭ estos malbela vetero...

Sed blankaj nuboj fornaĝis. Mal-
aperis. Beltempo rikolta! Reviga!

Ĉie muzikas falĉiloj kaj serpoj...

Kie tero pli bona — pli frue...

Kaj ĝoje aŭdiĝas kantetoj:

Janjo, mia Janjo,
rapide laboru.
Estos edziĝfestoj,
kiam gren' — en kesto...

Sed ĉar virin' ĉe l'danco aŭ falĉo
estas spiteŝma, trilas knabinetaj voĉoj:

Jaĉjo, mia Jaĉjo,
devos multe peti.
Pli facile serpi
ol la amon ĉerpi.

Dume mankas tempo por pripensi.
Laboro ne atendas.

En pena laboro forfluas la tago. La
suno direktas sian ĉaron okcidenten,
per purpura brilo priverŝante la ori-
tajn hubojn.

☆ ☆ ☆

Tempo por ripozi. Malrapide kre-
puskas. La kampo dezertiĝas. En la

fenestroj de kabanoj ekbrilis palaj lumetoj. El la kamentuboj supreniĝas kolonoj da blanketaj fumoj.

Svarmas en ĝardenetoj kaj kortoj. Tio, kion diradis surkampe la vortoj de l'kanto, diras nun buŝo al buŝo... Nur mallaŭte, murmure, sed tamen varmege kaj ame...

Janjo ne plu diras « ne ». Eble nenion diras, sed kor' ŝia per tuta sia voĉo vokas : jes !



Malrapide noktas... Steloplana, trankvila, silenta ekestos la nokto...

En la fenestroj de l'kabanoj estingiĝas lumetoj unu post la alia, kaj sur la ĉielo eklumiĝas stelo post stelo...

Ĉiam pli trankvile, pli silente, sonĝe kaj dorme...

Nur ie hundo ekbojas kaj alia respondas. La nokto ĉirkaŭbrakas la mondon. Peza dormo fermas la palpebrojn.



La somera nokto estas mallonga. Apenaŭ homo iom tradormis kaj jam mateniĝas.

La ruĝa suno signas la tempon de l'leviĝo.

Denove ektintos falĉiloj kaj serpoj...



Ĵaluzo

PARIZO...

Bela, aŭtuna tago finiĝas...

La suno ĵetas ankoraŭ faskon de siaj radioj sur la parkon de Luksemburg'...

Dorloteme, karese per siaj varmetaj radioj ĝi tuŝetas la Naturon, kiu siajn brakojn etendas por kapti ankoraŭ ĝian varmon, ĝian lastan spiron.

5.000.000 ~~~~~ 73

Kaj la radioj mole kisetas la velkantajn foliojn de l' arboj kaj la florojn kun mortetantaj kalikoj.

Kaj la floroj etendas, streĉas siajn lastajn fortojn al varmo, al suno. Ĉar morgaŭ eble ili ne plu ĝuos la varmon kaj ne plu sin banos en la radioj de l' suno...

Kaj ili faras tion tiel honteme, kvaŝaŭ timante, ke iu ne subrigardu ilin, kiel ili — kvankam kurbiĝintaj — ankoraŭ varmon kaj lumon avidas.

Ankoraŭ unu rebrilo kaj la suno *ĵaluzeme* retiras rapide la karesantajn radiojn.

Kaj ne plu lumas la suno, ĝi mortis por la naturo kaj — mi.

Krepuskiĝas.



Peze mi leviĝas el la ŝtona benko kaj direktas miajn paŝojn al la elirejo de la parko.

Aŭdiĝas ĉirkaŭ mi paroloj, ridetoj.

Ĉio forsonas preter miaj oreloj, sed subite mi streĉas la atenton, mi aŭdas voĉon molan, mildan, dolĉan :

— Ami virinon estas bonaĵo, sed esti pro ŝi ĵaluza, tio estas malbonaĵo, ĉar la ĵaluzo estas sento ridinda kaj vana.

Mi turnas la kapon.

Estas juna fraŭlino, kiu certe per tiuj vortoj volas elvipi el la kapo de sia amanto — ĵaluzemon.



Mi estas ĉe la pordo de l'parko. La bruo de la strato ne permesas prime-diton.

Mi ensaltas sur la platformon de aŭtobuso.

Ĝi ekmoviĝas... Iu sinjorino kun sinjoro postkuras ĝin. Mi helpas al la sinjorino ensalti. — La sinjoro mem devegas engrimpadi.

La sinjorino dankas al mi ne nur per vortoj, sed ankaŭ per gracia, dolĉa rideto, kian nur sinjorinoj sendi povas.

Ŝia edzo rimarkas tion kaj kaptante ŝian brakon nerve flustras :

— Sed kial vi ĵetas tian rigardon al homo, kiun vi ne konas.

Kaj li forkaptas ŝin, forportas kiel eble plej malproksimen de mi, en la unuan klason...

Ili sidiĝas ĝuste kontraŭ bela, ĉarma junulo, kiu koketeme ŝtelrigardas la sinjorinon...

La edzo ne vidas, lia tuta penso streĉita, lia ĵaluzemo vidas nur — min.

Kaj la ĉarma junulo profitas el la neatento kaj kaŝeme enmanigas al ŝi karteton...



Oni ne devas esti ĵaluzema.
La ĵaluzemo estas sensenca, vana...



Ni estas en la tempo de rapida vivo.
La fideleco estas nur longa
pacienco. Kaj multaj ne
plu havas tempon
— esti paci-
encaj...



La du boksistoj

LA situacio de la impresario Peĉ estis senespera...

Li disreklamis per grandaj afiŝoj en la urbo la alvenon de profesia pez-klasa boksisto, kvankam li ne estis certa pri la dato de lia alveno. La fama boksisto Ĵim intertempe flirtis kun sekretariino de esperanta societo. Elpelinte, post dekkelkjara fidela servado, sian duonon, li ekkaptis siajn

trikvaronojn kaj forflugis al Lokarno, kie inspirita de la pacema aero, li disdonadis senpagajn lecionojn, ne de bokso, sed de kalumniado...

La impresario ne sciis, kien povus konduki la postsignoj en lia serĉado... Kaj dume la afiŝoj, prezentantaj la boksiston kun ĉiama rideto kaj kun apenaŭ rimarkebla moveto de liaj brakoj, havis grandan sukceson. Neniu povis supozi, ke ĉio ĉi estas sen iu ajn antaŭa preparo. Venadis mendoj de ĉiuj flankoj de Paneŭropo. Ĉiuj aerlinioj estis jam rezervitaj al la felikaj posedantoj de biletoj por tiu memorinda tago aŭ pli ĝuste vespero. Sur la lipoj de ĉiuj virgulinoj estis la nomo de la konata ĉampiono. Ju pli altiĝis la kurzo de la biletoj sur la borso, des pli ĝi estis malagraba por la impresario. Li timis, ke la vespero

ne estu ĝis nun neekzistinta skandalo.

Dum simplaj amatoraj vesperoj la publiko estas relativa : ĝi toleras la ŝanĝon de la programo. Sed tute aliel sin prezentas la aferoj, kiam la vespero estas dediĉita al profesiaj sportistoj. Kaj ni ne forgesu, ke Ĵim estis ne nur negro, sed ankaŭ ĉampiono de l' tutmondo.

S-o Peĉ estis malgaja. Li sciis, ke per manoj kapti la aeron ne sufiĉas. Li maskis dume sian vizaĝon per trankvilo. Sed kiam venis tago de l' repago : doni al la publiko la negron por ĝia mono, li ektremis. Li estis certa pri la publiko : ĝi ne toleros la ŝanĝon kaj linĉos lin senskrupule.

Komence li havis la ideon ŝmiri per jodo iun luktiston kaj tiel trompi la publikon. Sed tio ŝajnis al li tro

granda risko. La publiko ne konsistis ja el esperantistoj kaj ne akceptus tian misarangon por sia mono. Ĝi povus lin pendigi anstataŭ nomi honora prezidanto aŭ doni medalon.

Sed jen venis al li genia ideo. Li rememoris al si, ke en la unuaranga hotelo « Sub l' Espero » troviĝas vera negro, nigra kiel asfalto, kun fortaj pugnoj.

Li vokis sian dikhaŭtan sekretarion kaj palpe-frapetante lian ventron, li ekkriis :

— Jen penso ! Kelkafoje mi havas admirindajn pensojn. Ni estas savitaj ! Veturu al la hotelo « Sub l' Espero ». Tie troviĝas pordisto-negro, simila kiel ĝemelo al Ĵim. Donu al li cent-frankan banknoton kaj alkonduku lin ĉi tie, eĉ se necesus perforto. Dume ni komencos la batalon de la unua paro.

Raportisto ĉiam troviĝas, kiam li havas la okazon de senpaga vojaĝo, eĉ se tio estas nur per aŭtomobilo. La sekretario kaj mi ensaltis fremdan aŭtomobilon kaj en kelkaj minutoj, ni troviĝis antaŭ la hotelo.

Antaŭ la pordego staris aŭtentika negro. Lia livreo konsistis el verdaj pantalonoj kaj surtuto, kies koloro similis kankran saŭcaĵon...

Li estis grave okupita. Li rigardis la kelneron, kiu ĵonglis per taso kun teo antaŭ proleta amerika milionulino kaj observis, kiel ŝi elpremadis la larmojn el citrono, por per ili agrabligi la teon...

La sekretario flirtis per cent-franka banknoto antaŭ la okuloj de la negro, kiel esperantisto per sia verda standardo, aŭ kiel toreadoro per sia ruĝa tuko antaŭ la virbovo sur la areno...

La efiko estis brila. Oni kuris al la direktoro de l' hotelo, por ke la afero estu honeste aranĝita. Kaj baldaŭ la dikhaŭtulo, la kolora civitano kaj mi troviĝis en la aŭtomobilo.

El la interparolado mi konstatis, ke li parolas perfekte esperanton, kvankam li tute ne konis la nomon de Zamenhof kaj ridis el siaj blankaj dentoj kaj kvazaŭ ruĝe ŝminkita buŝo, kiam mi insistis kaj provis lin konvinki, ke Zamenhof estis la kreinto de esperanto. Sed kontraŭe li bone konis la ĉefdelegiton de U. E. A. el Parizo kaj profunde memoris la historion de ĉiuj «suspektaj» aferoj. Li povis citi senerare ĉiujn eminentajn profesorojn, kiuj, bone pagataj, faras duhoran lekcion dumjare en la ĉefurbo de lia ŝtato. Mi eksciis samtempe de li, ke tie troviĝas nek unu lernejo...

Se mi ankoraŭ memoras, li estis el lando kvinoble pli malgranda ol *São Tome e Príncipe*. Li estis nur dudekjara.

Sinjoro Peĉ elkuris al nia renkonto. Li akceptis nin brakomalferme. La grava momento devigis lin al rapidaj decidoj kaj agoj.

— Estas necese, ke Ĉij (tia estis la nomo de la pordisto, nun avancinta al rango de eminenta boksisto), — ellernu kelkajn ĉefajn pugnobatojn. Kaj poste okazu, kio devas okazi.

Persone mi konsilis al Ĉij, ke li prenu la biblion, kiu sentuŝe kuŝis sur la noktotablo de Peĉ kaj ke li dumtempe legu kelkajn paĝojn, por ke la diablo ne malhelpu en lia sukceso...

Sed kontraŭ mia opinio, la negro estis rapide senvestita. Li ruĝiĝis pro

honto. Baldaŭ alvenis la trejnisto, survestis al li gantegojn, pantoflojn kaj trikoton. Tiel komenciĝis la unua en la esperanto-historio notata leciono pri bokso...

Sur la areno finiĝis intertempe la batalo inter norda kaj suda ĉinoj. Malvenkis la norda pro malgravaĵo. Li manĝis la unuan fojon en sia vivo, unu tagon antaŭe, rizon kaj kaptis lin malsano, konata ankaŭ en Paneŭropo. Li tamen volis honore defendi la farunaĵojn de l' Nordo kaj pro tio ne rezignis el la batalo kontraŭ la ĉino el Rizujo.

La publiko ŝvitanta pro emocio kaj ruĝa pro alfluo de sango kaj sinpre-mado, atendis senpacience la tutmondan ĉampionon, kiu scipovis tiel lerte silentigi la aliajn sur tiu verda tero...

Oni rezervis al mi la lokon, por kiu

kompreneble, mi pagis dudek-kvin frankojn. Prezo escepte favora por ĵurnalistoj.

Dume la negro saltis, veis, bruis, svingis per manoj, kiel hebreo, kiun oni pogromas, movis per piedoj, kva-zaŭ la eluzata energio kostus al li nenio... Unuvorte li troviĝis en ekstazo de fervora lernado...

Fine la masaĝisto kaptis lin duone kaj kun helpo de la Peĉa sekretario kuŝigis sur la kanapon. Eklaboris la vinagro kaj la spongo, kiam subite la pordo malfermiĝis kaj al niaj mirigitaj okuloj aperis en ĝi aŭtentika Ĵim.

Ekvidinte la kanapon, li ekdemandis seke :

— Kia nigra ĉimpanzo tie ĉi troviĝas?

— Bonan vesperon — eltusis Peĉ per sensora voĉo — mi ne sciis, ĉu

vi venos hodiaŭ. Tiu kolora civitano devis vin anstataŭi.

Ĵim estis kolore kolera. Sed jen subite li paliĝis. Li esprimis komence la deziron disfrakasi la ostojn de nia savonto... Fine li rezignis je tio kaj decidis lin sufokigi aŭ publike pendigi.

La impresario estis saĝa homo. Li svingis per mil-franka bileto antaŭ la okuloj de Ĵim. Tiu ĉi kaptis la bileton. Englutis ĝin sekunde lia poŝo. Li trankviliĝis. Estis decidite, ke ambaŭ eliros batali sub siaj respektivaj nomoj... Kia sukceso por Peĉ kaj plezuro por la publiko!

Ĵim metante la gantegojn murmuris subnaze :

— Mi masakros lin, nudligos aŭ faros el li maronan marmeladon.

La impresario nur petis, ke li ne

forgesu la kontrakton kaj ke ĉio povas okazi, kio devas okazi, sed nur post la kvina rundo.

Kiel atestanto de tiu terura sceno, mi ne volis reveni sur mian lokon, antaŭ ol doni mian botelon da konjako al la simpatia kaj tremanta kunfrata pordisto, por ke ĝi donu al li la necesan kuraĝon. Mi primielis la botelon per jenaj vortoj, kiuj iris el la profundo de mia koro :

— Ne saltu kiel cikado. Sed batu per via tuta forto en la sentaŭgan kapon de via kontraŭulo. Memoru, ke vi estas esperantisto kaj defendas ne nur la honoron de via estiminda lando, sed ankaŭ la honoron de multvaloraj esperantistoj.

Miaj vortoj efikis. Li elsuĉis avide la botelon da konjako. Li sukcesis tion pli rapide ol kelkaj prezidantoj

la fontojn de societaj kapitaloj. Kaj tuj li demandis al mi la duan.

Feliĉe ekgongis kaj mi povis senatente elserpentiĝi kaj kuri al mia seĝo, sur kiu mi trovis ĉarman estaĵon: nek viro, nek virino. Ne estis tempo malĝentili kontraŭ la duonsekso. Mi ne disputis pro la seĝo. La negroj eniris la ringon. Antaŭigis ilin en la funebra marŝo: masaĝistoj, kuracistoj, trejnistoj...

La negrojn oni aplaŭdis per ĝis nun nevidita entuziasmo...

— Ĵim, ĉampiono de l' tutmondo — prezentas la impresario.

Aplaŭdado, aplaŭdado...

— Ĉij, ĉampiono de l'... raŭkis li denove. Sed la aplaŭdado fariĝis tiom potenca, ke oni ne plu povis aŭdi ion ajn, kaj tiom pli la raŭkadon de la impresario.

Ĉiuj senescepte opiniis, ke Ĵim estos la venkonto. Ĉu povis esti aliel? Sed spite tio entuziasmo neniam vidita regis la rigardantaron. Kia plezuro vidi du negrojn!

Kiam Ĵim laŭ kutima etiko etendis sian manon por premi tiun de sia kontraŭulo, Ĉij ĵetis sin furioze el sia angulo sur Ĵimon. Nur kun granda peno oni sukcesis lin haltigi kaj klarigi per flankopugnado, ke lia kontraŭulo volis lin nur saluti sporte.

La publiko furiozis pro ĝojo... La prezo de la disvendataj glaciaĵoj duobligis.

La batalo komenciĝis. La pordisto Ĉij ĵetis sin kun tia impeto sur Ĵimon, ke tiu ĉi ŝtoniĝis pro teruro. Ĉij dume havis nostalgion. Li rememoris sian belan landon. Li frapis en Ĵiman kapon, kiel en ĝazbandan tamburon.

La reguloj de l' sporto, kiujn li neniam konis, estis for.

La publiko hurais kaj fajfis. La tuta konstruo tremis.

Finfine Ĵim perdis la paciencon. Li malarmis sin rompante kun la regularo. Pugnadis la pordiston ŝofore. Kaj la reeĥoj tondris en la konstruo.

La atmosfero estis paneŭropa...

La negroj atentis nek la fajfadon de l' publiko nek tiun de l' arbitraciulo. La gongo gongis, sed tio ankaŭ ne helpis. Simile kiel la preĝejaj sonoriloj al pekuloj aŭ piuloj...

La arbitraciulo forlasis la ringon kaj per tiu gesto publike demetis sian grandan honoron.

La galerio estis viva kiel gelateno. Ĝi piedfrapis la plankon kaj kriis entuziasme :

— Frap-frapu, frap-frapu...

Subite okazis io nekomprenebla. Ĝis hodiaŭ mi ankoraŭ tion ne komprenas. La fama ĉampiono, kiel elefanto, diskrucigis la brakojn kaj per sia tuta pezo falis sur la plankon de l' ringo. Ekaŭdiĝis sovaĝa krio. Tio estis la venkokrio de la pordisto, kiu ellernis ĝin sur la paneŭropaj sportejoj.

Necesis multe da pacienco al kuracistoj, trejnisto kaj masaĝistoj, por povi revivigi la konscion de la profunde sveninta Ĵim. Sed ĉio okazas en la mondo. Post la reviviĝo Ĵim ploris, ĉar li suferis. La unuan fojon li estis batita. Krome li perdis la gloran titolon de l' tutmonda ĉampiono.

Kruela sorto !

La postan tagon la tuta gazetaro skribis longajn raportojn. Ĉiuj admiris la batalintojn. Nur la sporta gazetaro ne estis tute kontenta.

La impresario fariĝis milionulo dum tiu unu vespero.

Nia pordisto tiom gustis en tiu nobla boksado, ke post serioza trejnado, li fariĝis profesia boksisto. Hodiaŭ li estas la dua majstro de nia kontinento.

Ĵim dume ekmalŝatis sian profesion. Li eklokis sian ŝparitan monon en la akcioj de unu esperanta entrepreno kaj fariĝis pordisto de la hotelo « Sub l' Espero »...



Senŝeligitaj Pensoj

SE vi volas esti honorata, do agu aŭ misagu kiel tiuj, kiujn oni honoras.

△▽△

Kial oni diras nur : virino falas ?
Laŭ mi, virino neniam falas sola, sed kun — viro...

△▽△

Oni parolas pli pri malvirtoj de virinoj ol — pri virtoj de viroj.

Δ▽Δ

La vera justulo estas tiu, kiu suferas por la justo.

Δ▽Δ

Estas malpli da brutaro kvarpieda ol dupieda sur nia tero...

Δ▽Δ

Eĉ neaktore, kiom da maskoj ni havas!

Δ▽Δ

Ju pli supre, des pli freŝa aero — pro tio ni komprenas, kial homoj deziras ĉiam pli altajn postenojn...

Δ▽Δ

Ne sufiĉas bleki pri homaro kaj paco, sed scipovi esti almenaŭ iom — honesta en siaj agoj.

Δ▽Δ

Kelkaj per blufado atingas pli, ol per laboro, pro tio ili blufas.

Δ▽Δ

La kulturecon de iu popolo oni ne mezuras laŭ venditaj lernolibroj, sed simple — laŭ libroj.

Δ▽Δ

Kelkaj opinias, ke per komercaj sferoj ni atingos la venkon, sed pli pravas tiuj, kiuj la forton de la movado vidas en la laboristaj sferoj kaj la intelektularo. Kaj tiu ĉi lasta mankas momente.

Δ▽Δ

La popolo (eĉ esperantista) estas inerta. Kiam ĝi penas krei kontraŭ reĝimo, tio neniam estas malprava. Estas do tempo ŝanĝi la reĝimon.

△▽△

Por bona politikulo (eĉ esperanta) du eraroj faras — veron...

△▽△

Tiuj, kiuj priŝteladis antaŭe estas nun aristokratoj, kaj tiuj, kiuj nun priŝtelas, fariĝos — morgaŭ.

△▽△

Ju malpli da inteligentaj en iu movado, des pli bone por la gvidantoj. Ĉar inteligenta aŭ neinteligenta, ĉiu pagas la saman obolon.

△▽△

La « valoro » de iu gvidanto ne montriĝas en liaj publikaj paroladoj, sed en lia postkulisa talentado.

△▽△

Per senĉesa rideto, flataj vortoj, vi gajnas ĉiujn, eĉ la plej honestajn, por — nehonestaj agoj. Per simpla sincero, vi perdas eĉ vian amikon.

△▽△

Amiko estas ofte tiu, kiun oni renversas post bona utiligo.

△▽△

Por iuj grand-sinjoroj kaj « famaj » idealistoj sufiĉas mono, bibliaj paroloj sur iliaj noktotabloj kaj en iliaj eldiroj, — la resto — *honesto* kaj *justo* — restas enfermitaj nur en la sufero.

rantaj Jezuoj, kiuj tiom multnombras
en la silenta mondo de simplaj, sen-
bruaj homoj...

△▽△

Vi serĉas la juston? Ĝia vorto ek-
zistas en la vortaroj kaj sur la lipoj
de homoj, kiuj faras kaj kreas mal-
juston.

△▽△

Ju pli vi iun malŝatas, des pli ad-
miru lin, se — li tion meritas.



En Papagonio

Mⁱ havis grandan honoron : esti
invitita al vespermangxo ĉe Lia
Ambasadora Moŝto de Papagonio.

Dum du antaŭaj tagoj mi nenion
mangxis pro tiu honoro kaj ŝparemo...
La tiel ekŝparitan monon mi intencis
dediĉi al bona afero. Kio pli valora
ol nia movado? Tiel mi povis fariĝi
membro de kelkaj novaj esperanto-
grupoj, kiuj jam posedis la unuajn

membrojn en la ekzempleroj de siaj prezidantoj.

Dume miaj intestoj muzikis funebran marŝon.

La tago promesita alvenis. La frako, kiun mi aĉetis antaŭ kelkaj jaroj, estis kvazaŭ alĝustigita ĉekorpe. La du fasto-tagoj tion helpis.

En la salonoj de la ambasadorejo — dudeko da personoj. Agrabla estis la societo. Kun sopiro mi atendis la vespermanĝon. La ŝanco, ĉu la honoro, metis min apud Ŝia Ambasadora Moŝto. Mi ne bedaŭris la fastadon. Ĝi donis al mi apetiton kaj ebligis prikonsideri ĉiun pladon aparte. Mia vid-al-vidulo, grafo So, enviis min pro tio.


Venis la deserto : ĉampano, likvoroj kaj kafo. Subite al la grafo So okazis akcidento malagraba, kiu povus same okazi al vi. Li neatente tuŝis la menu-

karton kaj renversis la sur ĝi starintan glason da ĉampano sur la tablon kaj kio pli terure sur liajn grafajn pantalonojn. Li ridetis, kvazaŭ nenio okazus. Alkuris lakeoj, ordigis la tablon. Dume la grafo So englitis la ambasadorajn apartamentojn. Tie li havis la honoron ŝanĝi siajn malsekajn pantalonojn je tiuj de Lia Ambasadora Moŝto.

Dume la gastoj detabliĝis kaj eniris aliajn salonojn, kie oni dancis, parolis, flirtis... Pri la renversita ĉampano kaj grafo neniu eĉ sufloris. Ĉiuj sin amuzis kiel ili povis. Ne mankis ankaŭ refreŝigaĵoj, kiujn lakeoj disportadis. D-ro Ko, la plej malaltranga sekretario de l' ambasadorejo, la sola laborulo, kiu meritas la salajron al li donatan, volis glaciaĵon. La lakeo pretis al transdono de bona porcio. Sed

okazis malgranda fakto, kiu pripen-
sigis min multe, kvankam en si ĝi
ja estis nur okazeto ne inda al medito.
Ĉe transdono la pokalo kun glaciaĵo
elfalis el la manoj de d-ro Ko. Ĉu
la lakeo misatente servis, ĉu la dok-
toro nelerte prenis la servaĵon, tion
mi ne rimarkis. Vi certe ne trovos
pri tio iun ajn noton en la diploma-
tiaj dokumentoj de la ŝtato de Papa-
gonio... Mia tuta atento ripozis tiu-
tempe en ĉirkaŭbrakado de la baronino
Po. Sed ŝi, duonsvenante en miaj
brakoj kaj permesante premi siajn
tridek-kvin jarojn, flustris en mian
orelon :

— Oni tuj vidas, ke tiu d-ro Ko
estas nur filo de simpla kamparano...



Dancante mi atentis, nun pli ol
antaŭe, ke mi hazarde ne tuŝu ŝian
baroninan — kalon, por ke per tio mi
ne endanĝerigu en ŝiaj fulmaj pensoj
Jezuon aŭ eĉ la tutan hebrea genton,
kaj vole-nevole esperanton...



Fluas rivereto, fluas...

FLUAS rivereto, fluas...
Ĉe l' bordo de la rivereto mi kuŝiĝis. Ĉe l' bordo de la rivereto tremetas la saliko. Speguliĝas la poplo. La frakseno disetendas kaj refermas vane siajn mil fingrojn por kapti la venton, kiu ĝin tiklas. La grandaj pinoj restas senmovaj kaj seriozaj, dum la vento, eniĝante inter ĝiajn pinglojn, modulas al ili heziteman kanton.

Ho, tero, jen mi kuŝanta sur via dorso giganta. Miaj okuloj rigardas ĉielen tra l' branĉoj. Miaj revoj sin movas inter ĉielo kaj tero. Tremas kaj skuiĝas kiel la saliko. Trembrilas kiel la poplo. Kaj mia koro, senmova en la movoj de miaj pensoj, kantas, kiel la grandaj pinoj, kanton senfinan de kareso...

Ho, tero, mia senokula patrino! Blinda kaj surda al sennombraj voĉoj, ekparolu! Mi aŭskultas vin. Kaj kion vi diros, scios mi rediri kaj ripetadi. Sed vi, neniam vi aŭdos la voĉon de via filo, kiu vin demandas: *Kial?* — Kun ĉiuj miaj revoj kaj ĉiuj miaj pensoj, mi tiom pezas sur via sino, kiom vermo malgrandeta... Sur via sino, kiun mi eniros...

Kial, de kie, kien? Por kiom da tempo, por kiom da tempo ankoraŭ?... — Silento.



Aŭskultu tiun krion de birdo super via kapo. La aero vibras, la birdo forpasas. Subite ĉio eksilentas. La vento haltas. La frakseno, la saliko, la poplo restas senmovaj. La pinoj ĉesas kanti.

La mondo enpensigas kaj la koro aŭskultas, atendas...



Dum sube, en la ombro, fluas rivereto, fluas seninterrompe kaj bobenas senreve siajn nelĉerpeblajn ondojn, la murmuron de l'eterno...

Aŭtuno

ANKORAŬ unu aŭtuno preterpasas... Argenta estas la ĉiel'. Ĉio ŝajnas trankvila en la matena lum', kiu, pli-fortiĝante, redonas al la folioj ankoraŭ iom da vivo kaj kolor'. La vento murmuretas inter la folioj el bronzo kaj or'...



Sed la tagoj fariĝas ĉiam pli mal-

longaj. Grizaj la matenoj kaj per humida nebul' envolviĝantaj...

Ĉiam pli da flavaj folioj sternas la teron. La vento ligas sin kun la suno kontraŭ la nebul'. Embuskas kaj pasias, trablovas la densan nebulon kaj dispelas ĝin.

Ĝemas ĉio ĉirkaŭ la kaban'. La ombro de aŭtuno ŝajnas leviĝi ĉiam pli forte, pli frape el la nigra kot', kiu brilas survoje.

Dumtage briletas ankoraŭ en suno la arboj per oro de siaj folioj, per purpur' kaj sepio. La vento forŝiras la lastan ornamon de heĝo: la flavigintajn foliojn el inter la dornoj. Ĵetas ilin teren kaj sur la lageton. La floraj koroloj svenas pro malvarmo kaj faletas malvive...

Vespere io veas en la parko kaj ploras super la laget'...

Aŭdiĝas plor' de birdo inter la branĉoj de mortanta arbo...

La hundo ĝemas boje...

Baldaŭ la suno, la varma sun' estos nur rememoro de l' pasinta tempo...


La morto de l' naturo...

La uragano hurlas kaj plendas inter la branĉoj de l' arboj kaj postkuras la foliojn, kiuj dancas... Dancas la lastan dancon de l' agonio...



Korvoj grakas malproksime...





U NE VERE ?

*Vi sentas vin pli bone,
ĉar vi — finlegis tiun libron.*

Vi estas sana kaj feliĉa.

Viaj okuloj radias per ĝojo.

*Vi gustumis ĉion kun kuireja arto
kaj kun apetito...*

*Se vi trovis en tiuj paĝoj viglan
agadon, dekoradon, lumon, humoron
jen sarkasman jen amaran, se rido, ĉu
sufero studenta, preskaŭ infana, suk-*

sisis vin interesigi, mistifiki, ĉu eĉ per kontrastoj de lirismo aŭ paradoksoj eksciti, — mi ne estus malkontenta.

Mi cetere esperas, ke neniel la tra-lego de tiu libro povis misinflui vian svelton, ĉarma legintino.

Vi ĝuis multe, vi diras. Mi dankas al vi pro tiu komplimento. Via opinio, la opinio de leganto, estas por aŭtoro ĉiam pli agrabla, ol ĉiuj falsetaj aŭ oficialaj laŭdoj, ĉu falsaj medaloj. Ĉar falseta laŭdo estas nur laŭdo — akre-sona, la oficiala — nur peco da papero, kaj medalojn oni disponas al tiuj, kiuj ilin ne meritas. Vi ridas? Mi dankas al vi. Tio pruvas, ke vi konsentas mian modestan opinion kaj komparon...

Vi volus, ke mi ankoraŭ iom babilu kun vi?

Bonvolu pardoni, sed neeble. La ovoj bolas sur la forno en la kuirejo.

Kio? Vi miras, ke mi devas pensi pri tia poezia okupo? Kion fari? Mi pruntedonis al la eldonisto tutan mian monon, por ke li povu presigi mian libron. Mi do sidas hejme, nutras min per liaj promesoj kaj vivas prolete. Ne ĉiu havas la ŝancon esti prizorgata de la ŝtato kaj sidi senzorge en — mal-liberejo...

Kvankam pli bona pano kun — butero, ol kuko kun — dependo...

Sed pri tio — alian fojon.





ENHAVO

La esperantista publiko	11
5.000.000	17
Buŝo, Okuloj kaj Koro	32
Al...	33
Sereno	35
Ŝi havis dek kaj li dek-kvin jarojn. . .	39
Kaj ĝi postsekvis min	52
La Amo	58
La Venĝo.	63
Sonas serpoj, lumas suno...	67
Ĵaluzo.	72
La du boksistoj	77
Senŝeligitaj Pensoj	93
En Papagonio.	99
Fluas rivereto, fluas...	104
Aŭtuno	107
Ĉu ne vere?	111





Eldonejo “Esperantista Voĉo”

S. GRENKAMP-KORNFELD

JASŁO (Pollando)

Poŝtĉeka konto : Krakovo N-ro 400-821

Bankkonto : Bankdomo Kornfeld, Jasło

Ĝirokonto ĉe U. E. A.

LIVERKONDIĈOJ

La livero okazas nur post **antaŭa** pago je la prezoj valorantaj **en la tago de la livero**. La prezoj estas montritaj en **svisaj frankoj**. El **eksterlando** oni pagu per bankĉekoj, **prefere** per bankbiletoj en rekomenditaj leteroj. Ni akceptas ĉiun alian valuton laŭ tagokurzo de alveno. Al **konstantaj klientoj** ni rekomendas malfermon de **konto** ĉe ni.

Por **sendkostoj** oni aldonu 10 % de la pagota sumo, minimume 15 ct. Por rekomendota sendaĵo oni plie aldonu 30 ct.

Libroj de ni forsenditaj restas nia propraĵo ĝis kiam ili ne estas entute pagitaj. — **Ni liveras ankaŭ ĉiujn** aliajn en la katalogo **ne cititajn librojn**. — Livereblo kaj prezoŝanĝoj rezervitaj.

VERKOJ PRI ESPERANTO

fr. sv.

Bastien, Naŭlingva Etimologia Leksikono 5.—

Cart, Vortoj de Profesoro Cart, luksa eld. kun 2 portretoj (140 p.) 3.—

— eldono sur Madagaskara papero, kun aŭtografo. Prezo je demando

— Pri Landnomoj 0.40

Fruictier & Grenkamp, Kompletaj Gramatiko kaj { broŝ. . 5.—

Vortfarado de Esperanto { bind. . 6.50

Grenkamp, Kompletaj Samouczek j. Esperanto 0.75

BELETRISTIKO

Balzac, La Firmo de la Kato, kiu pilkludas. 1.—

Balucki, Kuzeto (tr. Grenkamp) 0.25

Bossuet, Funebra Parolado (tr. Bastien) 1.—

En Svislando, kvin rakontoj kun ilustraĵoj	2.—
Florian, Du biletoj (tr. Bulhuis)	0.60
Frenkel, Verdaj Fajreroj	1.—
Gogol, Portreto (tr. Fiŝer)	1.50
Gordon, Kara Panjo (tr. Gego)	0.75
Grenkamp, Krioj de l' Koro	0.25
— Penseroj (II-a kajero)	0.40
— 5.000.000	3.—
Lermontov, Novaj Versaĵoj (tr. Bela Manto)	1.50
Mickiewicz, Improvizacio de Konrad	0.25
— Sinjoro Tadeo (tr. Grabowski)	6.50
Stephenson, Doktoro Jekyll kaj S-ro Hyde	1.25
Schmidt, La amkonkurantoj	0.50
— Gustav Vasa	1.90
Unterman, En danĝero	2.50
Wagner, Estu Homo! (tr. Meyer)	1.25
Wyslouch, El la lando de ruinoj (tr. Grenkamp)	0.25

MALOFTAĴOJ

D-ro Esperanto, Unua libro por svedoj (1889)	25.—
Kongresa Libro de la I-a Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer (164 paĝoj)	2.—
Schiller, La nevo kiel onklo	2.—
Kolovrat, Teorio pri evoluo de kono	0.50
Le Monnier, Evoluo kaj evoluismo	0.30
Scienca Revuo, jarkolekto 1904 (sen. n-roj 3, 4, 12)	8.—
— — 1905	10.—
— — 1906	10.—
Scienca Gazeto, jarkolekto 1912	8.—
— — 1913	8.—
— — 1914	5.—

Lingvo Internacia, la plej modele redaktita esp-a gazeto, ne-elĉerpebla fonto de esp-a historio kaj literaturo:

Jarkolekto 1896 (176 pĝ)	25.—
— 1900 (188 pĝ)	25.—
— 1902 (176 pĝ)	25.—
— 1905, dua volumo (288 pĝ)	5.—
— 1906, unua volumo (368 pĝ)	5.—
— 1907 (576 pĝ)	10.—
— 1908 (576 pĝ)	10.—
— 1909 (584 pĝ)	8.—
— 1910 (576 pĝ)	7.—
— 1911 (536 pĝ)	7.—
— 1912 (460 pĝ)	10.—
— 1914/20 (348 pĝ)	5.—

Dek diversaj n-roj de "Lingvo Internacia" (ĉ. 400-500 pĝ) 2.—

Literatura Almanako de "Lingvo Internacia" 1909. Ĉiuj artikoloj estas originalaĵoj de Akademianoj, kies portretoj sur ekstertekstaj folioj ornamas la libron. Krome troviĝas ankaŭ iliaj karikaturoj faritaj de lerta mano 2.—

Literatura Almanako de "Lingvo Internacia" 1910. Lukse ilustrita, tiu volumo estos la ĝojo de ĉiu, kiu amas niajn poetojn ŝatas sin rifuĝi, dum kelka tempo, el la senĉesa akra vivbatalo sub la liberspiran, lazuran ĉielon de la esp-a poezio. 2.—

Kongresaj Raportoj, bele broŝuritaj, humore skribitaj prezentas la veran bildon pri ĉiu kongreso aparte:

Oficiala protokolaro de la I-a Kongreso	0.40
Raporto pri la 3-a Kongreso (84 pĝ)	1.—
— — 4-a Kongreso (64 pĝ)	1.—
— — 5-a Kongreso (72 pĝ)	1.—
— — 6-a Kongreso (72 pĝ)	1.—
— — 7-a Kongreso (62 pĝ)	1.—
— — 8-a Kongreso (99 pĝ)	1.50
— — 9-a Kongreso (94 pĝ)	1.50

PAUL FRUICTIER
Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto

reviziita kaj kompletigita de

S. GRENKAMP-KORNFELD

Formato : 22 × 15 cm. 188 + V paĝ.

Prezo : broŝ. : fr. sv. 5.— ; bind. : fr. sv. 6.50

DUM SES MONATOJ PLI OL 1500 EKZEMPLEROJ VENDIĜIS

Jen kion diras la kritikoj :

La redaktoro Joseph Berger en *Heroldo de Esperanto* (25-7-30):

« ... En la antaŭparolo la reviziinto kaj kompletiginto s-o Grenkamp diras, ke li restas fidela al la observa metodo de Fruictier: *konstatu, ne proponu*. Kaj trastudante la libron, oni ekkonas, ke efektive la prilaborinto penis esti ĉiel objektiva.

« ... Ĝi enhavas... sub « Gramatiko » en unua loko ĉapitron pri fonetiko (laŭ mia scio ĝis nun trovebla en neniuj tiuspeca verko)...

« ... Laŭvere mi devas diri, ke la studado de tiu lerte reviziita, rekonite bona verko, estis agrabla dumlibertempa legaĵo por mi, esperantisto de jam dudek jaroj, kaj mi ne hontas konfesi, ke mi ankoraŭ lernis el ĝi.

« ... Mia konciza opinio pri la libro : Klara, objektiva kaj bonlingva instruilo por homoj enpenetremaj en nian lingvon. »

En *Sennaciulo* (26-6-30) :

« Jen bona libro en Esperantio... Pro bezono de kompleta gramatiko, en lastaj jaroj aperis diversaj gramatikaj libroj... Kvankam esp-e verkitaj... ili... estas nekompletaj. La verko Fruictier-Grenkamp estas certe pli kompleta, laŭ scienco, pedagogio kaj tipografio pli klara kaj bone prezentita. En ĝi abundas ekzemploj de Zamenhof kaj aliaj bonaj verkistoj...

« ... Resume, la libron mi rekomendas al la SAT-K-doĵ, kiuj en ĝi trovos multon nesciatan. (N. B.) »

En *ICK-Cirkulero* (62) :

« Tiu ĉi verko havis jam grandan famon en nia literaturo antaŭ la milito. La zorge faritaj aldonoj kaj kompletigoj, aldonitaj laŭ la ĝisnuna evoluo de Esperanto, de s-o Grenkamp-Kornfeld, L. K., igas la verkon ankoraŭ pli havinda. »

En *International Language* (Novembre 1930) :

« ... Fruictier'a libro estas, kaj por longa tempo restos, la plej bona el ĉiuj samspecaj verkoj. Ĝi estas nepre necesa al ĉiu, kiu volas perfektigi en Esperanto. »

Eldonejo « Esperantista Voĉo », Jaslo (Pollando)

Vortoj de Prof. Cart

al la pacaj kunbatalantoj dediĉitaj de

S. GRENKAMP kaj R. DE LAJARTE

140-paĝa, formato : 18 × 14 cm.

Prezo : fr. sv. 3.—

« ESPERANTISTA VOĈO », JASLO

« La ekstera aspekto de tiu libro — luksa eldono — tute ne kontraŭdiras ĝian enhavon... »

Le Monde (L. L.).

« ... Estas superflue diri, ke la tuta enhavo estas modela je la verka kaj lingva vidpunkto. Necesas nur insisti pri tio, ke la sperto instruas ĉiutage, ke la prilingvaj ideoj de s-o Cart estas ĝustaj kaj aprobindaj... »

Sennaciulo (14-5-27).

« Ŝajnas al ni, ke la eldonantoj ne bone elektis la titolon, uzante sole la simplan « vortoj » anstataŭ « oraj vortoj » ? Ĉar vere oraj vortoj por la esperantistaro estis, estas kaj restos por ĉiam ĉi tiuj artikoloj. Ĉiu ĝin aĉetu kaj legu ĝin atente ! »

Aŭstria Esperantisto (1927, N-ro 11).

« Jen la libro, kiu estos grava kaj aktuala dum ekzistos Esperanto. Eĉ ne unu esperantisto estu en niaj vicoj, kiu ne havus ĉi tiun libron inter siaj ĉiutagaj legaĵoj. Apud la lingvaj respondoj de D-ro Zamenhof ĉi tiuj vortoj devos esti ĉiam studataj kaj restudataj, ĉar ili entenas ideojn, kiujn ni senĉese devas al ni memorigi... Ĉiuj kluboj devas nepre posedi la libron. S-oj Grenkamp kaj Lajarte tre meritiĝis pro la aperigo de tiu ĉi kolekto. »

Konkordo (1927, N-ro 9/10).

« ... Ĝi estas plena de profundaj pensoj, trafaj fabeloj kaj saĝaj konsiloj... La tuta volumo estas ne nur kolekto de literaturaj juveloj, sed ankaŭ fonto de ĝojo kaj inspiro. »

International Language (1927).

ATENTU !

KIU LERNAS ESPERANTON,

tiu bezonas gazeton interesan, literaturan,
bonstilan, kun artikoloj kaj romanoj se-
rioaj kaj amuzaj ;

KIU LERNAS ANGLAN LINGVON,

tiu bezonas tekstojn malkarajn pri ak-
tualajoj ;

KIU PROPAGANDAS ESPERANTON,

tiu bezonas bonaspektan, bele presitan
gazeton, kun lastatempa informo pri la
Movado, kiu pruvos la seriozecon de nia
afero. Resume :

ĈIU BEZONAS

INTERNATIONAL LANGUAGE

Monata gazeto en angla kaj esperanta lingvoj

Jarabono : 2 ŝ. 6 p. (3 frankoj svisaj)

Petu provekzempleron ĉe « International Language »
(G. K.)

142, HIGH HOLBORN
LONDON, W. C. 1
ANGLUJO



SENDUBE

ĉiuj ŝatantoj de la
Esperanto-literaturo
legos avide la gazeton

LITERATURA MONDO

ĉar ĝi estas

LA PLEJ BELA LITERATURA GAZETO
en Esperantujo

Ĝian valoron garantias la ĉefredaktoroj :

JULIO BAGHY kaj KOLOMANO KALOCSAY

kaj la konstantaj kunlaborantoj :

J. D. APPLEBAUM, A. BEHRENDT, P. BENNEMANN,
M. BERARU, M. BLASSBERG, TH. CART, HELMI kaj
HILDA DRESEN, R. EICHENBAUMS, JEAN FORGE,
S. GRENKAMP-KORNFELD, L. HALKA, TEO JUNG, I. JU-
RYSTA, S. KAMARYT, KENELM ROBINSON, E. KNUTS-
SON, I. LEJZEROVICZ, W. LIPPMANN, T. MORARIU,
L. N. NEWELL, P. NYLÉN, JAN VAN SCHOOR, K. R. C.
STURMER, J. SUPICHOVÁ, R. SCHWARTZ, L. TOTSCHÉ,
LEONO, FELIKSO kaj LIDIA ZAMENHOF, E. WIESENFELD.

*La unua numero de la dua
periodo aperis la 1-1-1931*

Abonprezo por unu jaro :
40 pengoj, 7,50 markoj aŭ egalvaloro

Postulu prospekton kaj senpagan specimenon
ĉe la agentejoj en ĉiuj landoj, aŭ ĉe
Redakcio kaj Administracio :

LITERATURA MONDO

Bleier Vilmos, Hungarujo, Budapest IX, Boráros tér 6. IV. 11

LEGATA LEGBLA
LEGINDA
estas
OOMOTO INTERNACIA

4- aŭ 8-paĝa

Monata organo de UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO
Poŝtĉekkonto Paris 448-77

Beleco - Originaleco - Klareco

Jarabono kun senpaga U.H.A.-membrokarto: 3 sv. fr.
Premio de 5 belaj Oomoto-ilustritaj poŝtkartoj
kun Esperanto-teksto.

Petu senpagan specimenon!

Abonu ĉe **S-ro Koogecu NIŜIMURA**
124, Rue de la Pompe, PARIS-16^e

HEROLDO DE ESPERANTO

estas la ĉiusemajna ilustrita ĵurnalo de la Esperanto-movado. Aperas jam pli ol dek jarojn regule kiel horloĝo. Specimeno kaj riĉenhava Katalogo de Libroj senpage. Skribu al

Heroldo de Esperanto, Köln
Brüsseler Strasse 94, Germanujo.

Premiita Verko de la Esperantista Akademio

Estu Homo!

DE

CHARLES WAGNER

El la franca trad. S. MEYER

Tre bela volumo. — Prezo: fr. sv. 1.25

« La deveno de la homo, lia celo sur la tero, diversaj moralaj leĝoj, al kiuj la homo devas konformiĝi ktp. formas la enhavon de la libro... Rimarkinda estas la stilo... »

Oomoto Internacia (1930, N-ro 43).

Eldonejo « Esperantista Voĉo », Jaslo (Pollando)

LA MOVADO

MONATA GAZETO POR PROPAGANDO,
INFORMO, KOMERCO, TURISMO, KTP.

OFICIALA ORGANO

de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto
kaj de la Asocio « Esperanto kaj Komercio »

Redakcio kaj Administracio: 104, Rue de Richelieu, PARIS (2^e)

Direktoro: EMILE HOUBART

JARABONO: Francujo: fr. fr. 20.—

Alilando: fr. fr. 25.— kaj 30.—

CENTRA PRESEJO
ESPERANTISTA
(V. POLGAR)
33, RUE LA-
CÉPÈDE
PARIS
V

EN PREPARO :

S. GRENKAMP-KORNFELD

Esperanta Krestomatio


Jam delonge multaj bedaŭras, ke ne troviĝas verko, en kiu oni povu trovi la plej valorajn originalojn de multaj verkistoj, kies perloj dissemiĝadis dum multaj jaroj en diversaj revuoj. Kolekti la plej atentindajn, kiuj ne meritas la forgeson kaj perdon, entreprenis la kompilinto. Ni esperas, ke la esperantistaro kun ĝojo alhelpos per serĉado, konsilado kaj alsendado de materialo, kiun ĝi trovas enmetinda. La verko estos samformata kiel Fruictier-Grenkamp, *Kompleta Gramatiko*, kaj ĉ. 500-paĝa. Al ĉia helpemo sinceran antaŭdankon.

5.000.000

5.000.000

5.00

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000988189